

Co dalo Ĉeĉoslovensko ŝvetu.
La laboranta Ĉeĉoslovakujo.
Vedy duchové.

La spiritaj sciencoj.

De univ.prof. d-ro Miloš Weingart.

La spiritaj sciencoj, nome la fakoj filozofia, historia kaj filologia okupas en la strukturo de la ĉeĉoslovaka popolokulturo lokon precipe gravan, ĉar ili ĝis nun havis kaj havas la gvidan rolon en la vivo de nia popolo. Je la limo de l' 18-a kaj 19-a jarcentoj ili vekis nian popolon al nova vivo: la filologio redonis al ĝi la literaturan lingvon rafinitan kaj riĉigitan por la bezonoj de l'novtempa vivo; la historio redonis al nia popolo la konscion pri ĝia riĉa kaj glora pasinteco, instruis ĝin, ke ĝi rajtas postuli kaj pravas havi propran ŝtaton kaj fine, la historio preparis nian popolon al vivo politika. La ĉeĉa filozofio atingis sian kulminon en du viroj, nome, en Masaryk, kiu kiel praktika filozofo kaj heroldo de l'humanismo kaj pioniro de l'demokratio fariĝis unu el la kreintoj kaj instruistoj de l'nova Eŭropo, kaj en la sociologo Beneš, kiu estas la enkorpiĝinta postulo de Masaryk, ke la politiko havu bazon scienca.

Niaj spiritaj sciencoj povas postuli sian honoran lokon en nia popolokulturo kaj honore ili povas reprezenti nian popolon antaŭ la mondo. Sed, nature, alie oni taksas la rezultojn de l'scienca laboro el vidpunkto hejma kaj alie el la perspektivo tutmonda. Ekzemple, rigardante la epokon de nia renaskiĝo, neniu hodiaŭ dubas, ke Josef Jungmann, la kreinto de l'novĉeĉa literatura kulturo kaj de kvinvolvuma vortaro elirinta antaŭ cent jaroj, estas unu el la plej elstaraj individuoj de nia kulturhistorio. Sed lia signifo radikas antaŭ ĉio en la hejma medio, ĉar li dediĉis ĉiujn siajn fortojn al sia propra popolo.

Estas klare, ke scienca laboro pure porpopola ne influas ĉiam la sciencan de l'cetera Eŭropo. Ĝuste tiuj sciencistoj, kiuj dediĉas siajn fortojn al la esploro de l'hejmaj lingvo, literaturo kaj historio, anticipe oferas la eblecon veki pli vivan eĥon eksterlande, precipe, se ili apartenas al popolo malgranda. Tiun ĉi fakton demonstras niaj du eminentaj filologoj-bohemistoj el la fino de l' pasinta jarcento, nome la filologo Jan Gebauer kaj la literatur-historiisto Jaroslav Vlček. Ilia merito estas, ke ili transprenis novajn kaj tiam la plej bonajn metodojn uzatajn en eksterlando, aldonante al ili sian senlacan laboremon, sian konsciencan kritikemon kaj sian sintezan arton. Gebauer verkis la monumentan Historian gramatikon de l'ĉeĉa lingvo, Vlček la same gravan Historion de l'ĉeĉa literaturo. Kaj ili ambaŭ do apartenas al niaj grandaj spiritaj valoroj antaŭ la mondo. Ili vekas la respekton de l'eksterlandaj fakuloj al la ĉeĉa scienca laboro, kvankam ili ne povis influi la evoluon de siaj sciencoj en la cetera mondo.

Tiuj ĉi ekzemploj instigas nin, ke ni montru kelkajn karakterizajn trajtojn de l'ĉeĉa scienca laboro. Nia scienco distingiĝis antaŭ ĉio per la maniero, kiel ĝi solvadis la taskojn diktitajn de l'naciaj bezonoj. Ĝi distingiĝis do per solvado de konkretaj taskoj utiligante la alprenitajn metodojn kaj per organizado de l'scienca laboro. Ni ĉeĥoj prezentiĝas ankaŭ en la spirita scienco antaŭ ĉio kiel praktikuloj. Sed kontraŭe, nia ĉefa forto ne montriĝas en la malkovrado de novaj horizontoj, en la starigo de fundamentaj vidpunktoj kaj en la kreado de novaj metodoj.

Necesas kalkuli kun tiu ĉi fakto, kiun oni povas rigardi karakteriza trajto de l'ĉeĉa popolokaraktero. La ĉeĉa spiritscienca laboranto pruvis kaj verŝajne pruvos ankaŭ estonte sian rimarkindan kapablon solvi sciencajn taskojn, kiuj ne devigas lin al ĝeneralaj konsideroj kaj tie, kie li povas labori kun faktoj, precipe kun faktoj rilatantaj al la sorto de lia propra medio kaj samtempa vivo. La demandon pri la rilato de l'scienco al la vivo respondis niaj spiritaj sciencoj plejparte pozitive. Tial niaj historiistoj kaj filozofoj tiel facile transiradis al politiko, niaj filologoj al kreado kaj reguligo de l'literatura lingvo kaj fine, niaj literatur-, art- kaj muzik-historiistoj al kritiko de l'arto.

La ĉeĉoslovaka popolo honore kaj riĉe atribuis al la tutmonda scienco. Ni ne forgesu, ke nia universitato en Praha ekzistas jam 600 jarojn. Tiu ĉi fakto havas kulturalan valoron tutmondan. Ne estis ĝis nun ĉiuflanke rekonitaj la meritoj de tiu ĉi universitato, kiu notinde levis la kulturnivelon

de l'14-a kaj jarcento kaj komence de l'15-a en la tuta centra Eŭropo, precipe en Polujo, Hungarujo, Aŭstrio kaj Germanujo. La ĉeĥa kulturo de tiu ĉi epoko, la epoko de Karlo la IV-a, nomata de sia dankema popolo "Patro de l' patrujo", montriĝas valoro de Eŭropa graveco. Tio validas same pri la scienco, kiel pri la arto, speciale arto poezia. Necesas mencii la plej eminentan profesoron de nia universitato el tiu epoko, nome la magistron Jan Hus, ĉar li estis ne nur religia reformisto, sed ankaŭ brila filologo. Lia reformo de l'ortografio doninta al ni literojn supersignitajn estis science tiel trafa kaj praktika, ke ĝi iĝis modelo al reformoj ĉe aliaj popoloj kaj al scienca transskribo en fonetiko. Filologon de Eŭropa graveco ni povas citi ankaŭ el la epoko de l'humanismo. Ĝi estas Zikmund Hrubý z Jelení, konata eksterlande sub la nomo Gelenius, kiu, invitita de Erasmus de Rotterdam, famiĝis en Bazileo (Basel) en la 16-a jarcento per eldonado de latinaj kaj grekaj verkoj klasikaj. La kulturo de l' ĉeĥaj fratoj apartenas al la mondo per ilia lasta episkopo, nome Jan Amos Komenský-Comenius, per kiu la ĉeĥa penso leviĝis al plej alta supro. Liaj didaktikaj verkoj estas elirpunkto de pedagogio, liaj pansofiaj klopodoj estas memorinda celado krei modernan homon harmonian, fondi novan eŭropanismon. En Komenský manifestiĝis per plej puraj trajtoj la tipo de ĉeĥa praktika filozofio, kio estas la plej inda legitimacio antaŭ la mondo.

La ĉeĥan raciismon reprezentas Josef Dobrovský. Li estas unu el la malmultaj ĉeĥaj geniaj esploristoj, kiuj sukcesis doni al sia laboro por la propra popolo gravecon kaj valoron tutmondan. Li starigis la normojn de l'propra literatura lingvo kaj konstruis ĝian historion, sed krom tio li propre kreis novan sciencon, nome la slavan filologion, per kiu li ege akcelis la renaskiĝon de ĉiuj slavaj popoloj.

La ĉeĥoslovaka romantiko donis al la mondo du sciencistojn de slovaka deveno: nome la arkeologon Josef Šafařík kaj la heroldon de l' solidareco inter slavoĵoj Jan Kollár. Ilia slovaka deveno montriĝis per pli viva sento kaj kuraĝo, ja dramatika patoso de iliaj pensaj konkludoj. Ĝuste per tiuj ĉi ecoj ili distingiĝas de la pli sobraj sciencistoj ĉeĥaj. Tiu ĉi granda trio – Dobrovský, Šafařík kaj Kollár - konkeris al la ĉeĥoj gvidan rolon inter ĉiuj slavoĵoj, precipe ĉe malgrandaj slavaj popoloj, ĉar iliaj sciencaj konkludoj baziĝis sur tipa ĉeĥa filozofio, filozofio de helpema humanismo. Ankaŭ ili apartenas al la gravaj spiritaj kreintoj de l'novtempa Eŭropo. Al ili aliĝas la granda historiisto, filozofo kaj politikisto František Palacký, kiu per sia verko metis la fundamenton al la historia filozofio kaj ĉeĥa politiko transprenita de Masaryk.

La romantikan tradicion slavistikan daŭrigis en la epoko de l'pozitivismo la historiisto Konstantin Jireček, kiu fariĝis unu el la pioniroj en la kultura vivo de l'liberiĝintaj bulgaroj kaj unu el la plej meritplenaj esploristoj de l'Balkano.

Almenaŭ mencii ni devas ankaŭ la brilan filologon Josef Král pro liaj studoj pri Platono, plue la slaviston Jiří Polívka, kiu montris al la studo de fabeloj novajn vojojn kaj fine la estetikiston kaj arthistoriiston Miroslav Tyrš, kiu en modela maniero akordigis teorion kun praktiko: li faris la antikan idealon principo en la korpa kaj spirita edukado de l'popolo, nome en la mondfama organizaĵo Sokol.

En tiu ĉi ĝenerala skizo ni ne parolis pri sciencistoj vivantaj. Ĝi tamen elmontras, ke ĉiuj grandaj kulturaj epokoj de l'Eŭropa historio trovis en niaj spiritaj sciencoj tipajn reprezentantojn, kiuj dote alportis al la tutmonda pensado novajn instigojn, kreantan laboron kaj la plej karajn valorojn de nia patrujo.

Tradukis Th.Kilián.
30-10-35.